



Novjorka Prismo

Numero 156

Septembro 2006

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia septembra kunveno

Dato: Vendredon, la 15-an de septembro 2006, 6:30-9:00 pm

Loko: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – **Tio, kion ni faris dum la somero.** Raportoj pri la UK en Florenco, kaj diskutrondo pri la ELNA kongreso en Novjorko. Kiel ni povus plibonigi kaj plifaciligi preparadon kaj realigon de estontaj novjorkaj kongresoj? Eble oni faros sugestojn por ĝisdatigi la libreton “Kiel organizi la Landan Kongreson de ELNA”. ★

Nia Jara Pikniko

La 17-an de junio 11 geesperantistoj iris al la Vintra Ĝardeno de la Monda Financ-centro ĉe la urbo-centro de Novjorko por la jara pikniko de ESNY. Post duonhoru ni eliris, ĉar la vetero estis bona, kaj trovis tablojn kaj seĝojn en bela ombra areo apud la haveno. Ni ankaŭ ĝuis la pasteĉon kiun mi preparis per morusberioj, kiujn mi persone rikoltis ĉe Stuyvesant Cove. Niaj amikoj, Silvia Rotenburg kaj Carlos Uria el Argentino, ĉeestis kaj internaciigis la etoson. Ankaŭ Allan Fineburg, malnova esperantisto el Nov-Jersejo, partoprenis. ★

– Tomaso ECCARDT



ESNY piknikantoj en la Vintra Ĝardeno.

Someraj Eventoj

de Tomaso Eccardt

Governor's Island

Je sabato, la 5-a de aŭgusto, ses novjorkaj geesperantistoj malkovris novan insulon de la insula urbo, Novjorko. Mi aludas al Governor's Island, kiu ĝis nun neniam estis malferma al la publiko. Ni promenadis tra la tutan viziteblan parton de la insulo, kaj vidis, i.a., Fuorton Henry, Kastelon Williams, kaj la domon, kie Reagan kaj Gorbeĉev renkontiĝis. ★


La filmo “Goodfellas”

Mi persone ne ĉeestis la filmon. Ĉu iu el vi ĉeestis? ★



La Bronksa Bestogardeno

La 4-an de septembro nur Rolando Marks kaj mi vizitis la Bronksan Bestogardenon. Ni vidis plurajn intereseajn aferojn, kiel tigrojn, bizonojn, gorilojn. Tiu tago estis amerika-indiĝena tago kaj indiĝeno rakontis historietojn. Mi demandis al li pri la indiĝena gestolingvo, kaj li iomete ilustris rakonton per gestoj por mi. ★



Someraj Eventoj

(daŭras de paĝo 1)
de Tomaso Eccardt

Preparado por la ELNA kongreso

Dimanĉe, la 2-an de julio, 11 ESNY-anoj kunvenis ĉe IBM Plaza por finaligi nian planadon por la venonta ELNA kongreso ĉe FIT. Ĉiuj estis entusiasmaj kaj volontulemaj kaj multe aprobis la proponitan kovrilon por la kajero de la kongres-libro bele preparita de Jim kaj Nancee Medrano. ★



La ELNA kongreso

Ne estis neformala ESNY kunveno je la tria semajno de julio, ĉar hazarde okazis ELNA kongreso en la Granda Pomo post 11-jara intervalo. Mi volas danki la volontulojn, kiuj multe hepis sukcesigi la kongreson! Por priskribo, venu al nia septembra kunveno. ★



Filippo Dorcas
Prezidanto de ELNA

Laste vizitis

Dum la ELNA kongreso, du el miaj gastintoj regastis ĉe mi. Gerardo TOBIAS, pola internacia vagemulo kaj lignaĵisto vojaĝis de la koro de usono por ĉeesti la kongreson. Li pasigis du noktojn ĉe mi. Poste, Bharat K. GHI-

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Septembro 2006 **15**

ESNY KUNVENO

Tion, kion ni faris dum la somero.
Raportoj pri la UK, ELNA en NY, ktp.

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Oktobero **1**

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 157)

20

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)
"IBM" Building Atrium
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

MIRE el Napalo informis min, ke li bezonas loĝejon je sia lasta tago en Novjorko, do li anstataŭigis Gerardon. Bharat ankaŭ estas ĝenerala sekretario de la Napala Esperanto-Asocio. ★

– Tomaso ECCARDT



Fotoj: Tomaso Eccardt, Enrike Ellemberg

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Koresponda Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Nijl Blonstein
(212) 410-3950

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 813-2495

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 156 – Septembro 2006
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York